**Protokolo de la 64-a kunsido de la senato** de AIS (la 58-a post la oficialigo de AIS fare de la Konsilio de la XII, la 67-a post la fakta eklaboro) okazinta la 2012-04-15 en Munkeno, Eine-Welt-Haus, Schwanthalerstraße 80, ĉambro 109. Kunsidtempoj: 13h00–14h00, 16h00–18h00.
Ĉeestantoj: Profesoroj Hans Michael Maitzen, Hans Dietrich Quednau, Reinhard Fössmeier, Günter Lobin, Bengt-Arne Wickström.

(1) *Formalaĵoj.* OProf. Maitzen kiel prezidanto gvidas la kunsidon. La senato estas kvoruma. OProf. Lobin kiel vicsenatano anstataŭas OProf. Poláková, kiu pro malsano ne povas partopreni. La senato decidas la tagordon evidentiĝanta el tiu ĉi protokolo.

(2) *Elektoj.* En apartaj voĉdonadoj la senato elektas sen kontraŭvoĉoj: OProf. Quednau kiel vicprezidanton, OProf. Fössmeier kiel senatan sekretarion, OProf. Wickström kiel trezoriston, OProf. Quednau kiel direktoron de la ekzamenofico kaj AProf. Barandovská-Frank kiel vicdirektoron de la ekzamenofico.

Kiel konstantajn membrojn de la ekzamenofico la senato elektas: OProf. Wickström (sekcio 1), ASci. Gobbo (2), OProf. Kiselman (3), ADoc. Macko (4), ADoc. Brewer (5), OProf. Lobin (6).

(3) *Alvokoj kaj rangoaltigoj.* La senato altigas la rangon de AProf. Dr. habil. Vera Barandovská-Frank al tiu de orda profesoro kaj tiel alvokas ŝin kiel plenrajtan membron.

Anstataŭ la sekcikunsido de sekcio 2 la senato altigas la rangon de ASci Federico Gobbo kaj ASci Michele Gazzola al ADoc.

(4) *Studadsesioj kaj ekzamenoj.* AIS ankoraŭ ne ricevis inviton al Varsovio de *Warzawska Szkola Zarzadzania – Szkola Wyssza; se ĝis la fino de majo alvenos invito por la tempo inter la lasta semajno de aŭgusto kaj la tria semajno de septembro, AIS okazigos tie kaj tiam SUS 33.*

(5) *Instruteko.* Laŭ iniciato de OProf. Wandel la retejo edukado.net enretigis du kursojn de kolegoj Wandel kaj Barandovská-Frank. Kursanoj devas registriĝi ĉe edukado.net kaj povas post ĉiu leciono partopreni retan ekzameneton por kontroli sian lernsukceson.

(6) *Sciencaj garantiantoj.* Laŭ decido de la Ĝenerala Asembleo la senato alvoku konsilion de „sciencaj garantiantoj“, kiuj decidas pri la sufiĉeco de la scienca nivelo de instru-tekaj kursoj kaj pri la kreado de novaj studaddirektoj.

La sekretario kontaktu eblajn interesulojn.

(7) *Diversaĵoj.* OProf. Minnaja pordume pagis la notarian fakturon pri formalaĵoj en San-Marino; la sumo estu kompensita al li.

La sekva senatkunsido okazu dum SUS 33, se ĝi okazos ĉi-jare. Alie la senato rete decidos pri la sekva kunsido.

Munkeno, 2012-04-15
OProf. Hans Michael Maitzen, prezidanto
OProf. Reinhard Fössmeier, protokolanto